

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo
Redakcio kaj Administracio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

VOL. 1 N-RO 3
JUL. 1950

人民中國報導

EN TIU ĈI NUMERO:

Pri la Deklaro de Truman
Ĵenĉienhu Konkeras Malsaton
dum Inundo
Scienco en Nova Ĉinio
Laboristoj Arde Amas Prezidan-
ton Maŭ
En la Vagonaro "Amaso"

LA 29a DATREVENO DE LA FONDIĜO DE LA ĈINA KOMUNISTA PARTIO

Dudek naŭ jaroj jam forpasis de post la fondiĝo de la Ĉina Komunista Partio je la 1-a de julio, 1921. Ekde sia fondiĝo kaj tra la sekvantaj periodoj de la Granda Revolucio de 1925—27, la Dekjara Interna Milito de 1927—36, la Kontraŭ-Japana Milito kaj la nuna Popola Liberiga Milito, la Partio trapasis zigzagan vojon plenan de grandaj malfaciloj ambaŭ internaj kaj eksternaj. Ĉi tiu partio de la laboranta klaso pruvis sin ambaŭ eltenema kaj nedetruibla en sennombraj bataloj kontraŭ siaj diversaj malamiko. Dum ĉi tiuj jaroj da heroaj luktoj, la Partio disvolvigis de grupo da marksistoj en grandan partion kun membraro de pli ol kvin milionoj.

La Partio ŝuldas ĉi tiujn grandiozajn atingojn ĉefe al la fakto, ke ĝi estas partio de la proletaro, partio de nova tipo dediĉita tutkore al servado al la ĉina popolo kaj konstrui la solidan fundamenton de marksismo-leninismo kiel aplikata en Ĉinio. Per firma efektivigo de la fundamenta organiza linio de rilatiĝo kun la popolo, la Partio profunde enradikiĝis inter la amasoj kaj farigis bone-disciplinita partio intime ligita kun la popolamasoj. Unuigante la teorion de marksismo-leninismo kun la praktiko de la ĉina revolucio, la Partio brile efektivigis la bazajn politikojn de la unueca fronto kaj armita lukto—karakteriza por duonfeŭda kaj duonkolonia Ĉinio—kiuj certigis la nunan venkon de la ĉina revolucio.

Ĉi tiuj politikoj de la Ĉina Komunista Partio—la necesegaj armiloj de venko—estis formulitaj sub la brila gvidado de la granda gvidanto de la Partio, Kamarado Maŭ Ze-tung, kiu science kunligis la teorion de Marks, Engels, Lenin kaj Stalin kun la konkretaj kondiĉoj de la ĉina revolucio. Estas sub la standardo de Maŭ Ze-tung ke la Partio kaj la popolo pasis de venko al venko.

Sub la standardo de Maŭ Ze-tung, la Milito de Liberigo sukcese finiĝis sur la deŝtero de Ĉinio kaj ankaŭ gigantaj sukcesoj atingiĝis sur la ekonomia fronto. En malpli ol unu jaro post sia establiĝo kaj malgraŭ severaj naturaj katastrofoj, la Centra Popola Registaro, sub la gvidado de Prezidanto Maŭ Ze-tung kaj la Komunista Partio, jam alproksimiĝis al bilancita budĝeto, centralizis siajn financojn, finis la 12-jaran inflacion kaj fundamente atingis la longe atenditan stabilecon de nacia ekonomio. Brilaj perspektivoj malfermiĝas antaŭ la ĉina popolo. Por la unua fojo en moderna historio, la financa kaj ekonomia situacio de Ĉinio komencas plibonigi.

Gajege la popolo celebris la naskiĝtagon de la Partio, kiu gvidis la ĉinan popolon al emancipo el la subpremo de feŭdalisma, imperialismo kaj burokrata kapitalismo; kiu, per siaj senĉesaj kaj sindonaj penoj, gvidis la 475-milona popolo de Ĉinio al venko, kiu donas al ili la ŝancon—la unua post jardekoj da preskaŭ seninterrompa milito—por komenci taskojn de paca konstruado; kaj kies historia venko ne nur multe plifortigis la tendaron de mondpaco, sed, sekvante la ekzemplojn starigitajn de la Granda Oktobra Revolucio, refoje konfirmis la universalan veron ke "la regno de laboro povas esti kreata de la penoj de la laboranta popolo mem." (Stalin).

Malgraŭ la fakto ke antaŭ ili ankoraŭ estas multaj malfaciloj, la ĉina popolo firme fidis ke ilia lando baldaŭ atingos fundamentan plibonigon, ĉar ili havas kiel sian gvidanton bone harditan Komunistan Partion kaj grandan Maŭ Ze-tung.

Internacie, la venko de la ĉina revolucio, gvidata de la Komunista Partio, ne nur rompis la imperialisman fronton en la Oriento, sed efektive klinis la ekvilibron de fortoj en la mondo favore al la kampo de paco, estrata de Sovetunio. La influo de ĉi tiu venko estis kaj estas pli kaj pli sentata ĉie en la mondo. La militantaj popoloj de la koloniaj kaj duonkoloniaj landoj, kiuj estas batalantaj heroe por nacia liberigo, ricevos grandan kuraĝigon el la sukcesoj de siaj ĉinaj fratoj. Ili ankaŭ trovos riĉan provizon de revolucia sperto amasigita de la Ĉina Komunista Partio en sia firma kaj severa lukto dum la lastaj 29 jaroj.

La granda centra tasko nun staranta antaŭ la Ĉina Komunista Partio estas efektivigi radikan plibonigon en la ekonomian kaj financan situacion de la juna respubliko, kiu naskiĝis en la mezo de longdaŭra milito. Kaj, por atingi ĉi tiun celon, la unua paŝo devas esti efektivigo de agrara reformo en la nove liberigitaj regionoj. Por garantii la glatan plenumon de ĉi tiu nova tasko, la Centra Komitato de la Ĉina Komunista Partio decidis komenci movadon por remuldi la laborstilon en la tuta Partio, por ĝustatempe reorganizi kaj solidarigi sian anaron por la periodo post la venko kaj plifortigi siajn kunligojn kun la vastaj popolamasoj. Samcele la Centra Komitato decidis plibonigi la staton de organizo de la Partio, reguligi la konsiston de sia membraro kaj altigi ĝian kvaliton.

La brila venko de la Ĉina Komunista Partio estas nedisigebla de ĝia korekta laborstilo. Prezidanto Maŭ Ze-tung diris: "La Ĉina Komunista Partio, armata per la ideologio de marksismo, kreis novan stilon de laboro inter la ĉina popolo, kiu estas ĉefe kunforĝado de teorio kaj praktiko, intimaj rilatoj kun la popolo kaj memkritiko."

Kamarado Maŭ Ze-tung kaj la Centra Komitato de la Partio konstante uzas la metodon de memkritiko por eduki la Partion, ke kamaradoj tra la tuta Partio kontinue korektas la difektojn kaj erarojn en sia laboro kaj garantias la progreson de la kaŭzo de la Partio.

La remuldaĵ movadoj foje kaj refoje efektivigitaj de la Centra Komitato tra la tuta Partio estas ja metodo de grandskala memkritiko. Ĉar multaj difektoj kaj eraroj, precipe komandismo, ekkreskis en la laboro de nia Partio dum la pasinta jaro samtempe kun la granda venko, la Centra Komitato de la Partio lasttempe decidis komenci novan remuldan movadon por fari radikan kaj sisteman korekton de ĉi tiuj difektoj kaj eraroj.

Tia movado por remuldi la laborstilon de la Partio ludos grandan rolon en levado de la konscio de la tuta Partio kaj antaŭenpuŝo de ĝia laboro. La ĉefa celo de la nuna movado estas korekti komandismajn metodojn en laboro, plifortigi rilatojn inter la Partio kaj la popolamasoj en la urbo kaj kamparo kaj fortikigi la popolan demokratian unuecan fronton, por faciligi la efektivigon de agrara reformo en la nove liberigitaj kamparregionoj, kaj la laboro de reĝistigo de industrio kaj komerco* en la urboj.

Plibonigi la staton de organizo de la Partio kaj remuldi ĝian laborstilon estas du aspektoj de unu ĝenerala tasko—t.e., altigi la politikan kvaliton de la Partio por faciligi la solidarigon de unueco kun la popolamasoj.

La Centra Komitato de la Partio esperas absorbi paŝo post paŝo en la venontaj tri ĝis kvin jaroj trionon de ĉiuj industriaj laboristoj en la Partion kondiĉe ke ili havas sufiĉe da revolucia konscio. Aliflanke ĝi decidis ĉesigi akcepton de membroj en la kamparo de la malnovaj liberigitaj regionoj ĝenerale kaj ne ekspansii la partiajn organizojn en la nove liberigitaj regionoj antaŭ la plenumo de agrara reformo.

Estas nun necese por la Komunista Partio de Ĉinio ne nur reguligi la socian konsiston de sia membraro, sed ankaŭ fari ĉiujn eblajn penojn doni partian edukon al la granda nombro da novaj membroj, kaj uzi konvenajn rimedojn elkribri tiujn oportunistojn kiuj jam enŝtelis en la Partion kaj tiujn kiuj havas grandajn difektojn kaj estas nevolontaj ilin korekti ĉe post ricevo de eduko, kaj elimini ilin el la Partio.

Nur post la plibonigo de la stato de organizo de la Partio kaj la remuldigo de la laborstilo, povas la Partio unuigi pli efike la popolamasojn, glate atingi radikan plibonigon en la ekonomiaj kaj financaj kondiĉoj de la ŝtato, plenumi la laboron de agrara reformo en la nove liberigitaj regionoj, venkbati la intervenon de usona imperialismo kaj liberigi Tajvan kaj ĉiujn aliajn teritoriojn de Ĉinio. Sen iom da dubo, ni devas plenumi ĉi tiujn taskojn kaj ni kapablas ilin plenumi.

* La reĝistigo de industrio kaj komerco estas farata laŭ la Politiko de bono al ambaŭ laboristoj kaj kapitalistoj, zorgo pri ambaŭ ŝtataj kaj privataj entreprenoj, interhelpoj de urbo kaj kamparo.



Prezidanto Maŭ Ze-tung

PRI LA DEKLARO DE TRUMAN

En la agendo de la 8a kunveno de la Konsilo de la Centra Popola Registaro, inter aliaj, estis raporto pri la nuna internacia situacio fare de Ĉefministro kaj Ministro de Eksterlandaj Aferoj Ĉou En-laj. Post la raporto, li faris deklaron pri la deklaro de Prezidanto Truman de Usono je la 27a de julio. Sekvis intensa diskuto.

La parolintoj unuanime opiniis, ke la deklaro de Truman ĝisfunde malkovris la veran vizaĝon de usona imperialismo kaj ke la popola registaro kaj la tuta popolo de Ĉinio sukeese venkbatis ian ajn incitadon fare de la usona imperialismo kaj liberigos Tajvan kaj ĉiujn aliajn teritoriojn apartenantajn al Ĉinio.

En la fino de la diskuto, Prezidanto Maŭ Ze-tung parolis kaj diris:

"La ĉina popolo jam antaŭ longe asertis, ke la aferojn de diversaj landoj tra la mondo devas disponi la popoloj de la respektivaj landoj mem. kaj la aferojn de Azio devas disponi la popoloj de Azio mem, kaj ne de Usono. La usona agreso nur incitis vastan kaj firmen rezistadon de la popoloj de Azio.

"Truman deklaris je la 5a de januaro ĉiutage, ke Usono ne sin entrudus en Tajvanon. Nun li mem pravas ke lia deklaro estis falsa kaj li disŝiris ĉiujn internaciajn interkonsentojn de Usono pri ne-entrudiĝo en la internajn aferojn de Ĉinio. Ĉi tiu senkaŝa ekspono de Usono pri sia vera imperialisma vizaĝo estas utila al la popolo de Ĉinio kaj la popoloj de Azio.

"Tute senmotiva estas usona interveno en la internajn aferojn de Koreio, Filipinoj, Viet-Nam kaj aliaj landoj. La simpatio de la popolo tra tuta Ĉinio kaj la vastaj amasoj de la popoloj tra la tuta mondo estos en la flanko de la agresatoj kaj certe ne en la flanko de usona imperialismo. Ili estos nek aĉetitaj de imperialismo nek malkuraĝigitaj de ĝi. Imperialismo estas ekstere forta sed interne malforta, ĉar ĝi ne havas subtenon inter la popolo. Unuĝu la popolo de tuta Ĉinio kaj la tuta mondo, plene sin preparu kaj venkbatu ajnan provokon de usona imperialismo!"

La kunveno unuanime aprobis la enhavon de la deklaro de Ministro de Eksterlandaj Aferoj Ĉou En-laj pri la deklaro de Truman, kiu legiĝas kiel jene:

Instiginte la pupan registaron de Syngman Rhee en Suda Koreio povoki internan militon en Koreio. Prezidanto de Usono Truman faris deklaron je la 27a de junio, dirante ke la usona registaro decidis malhelpi per armita forto nian liberigon de Tajvan. Ordonite de Truman, la Usona 7a Militŝiparo jam moviĝis al la bordo de Tajvan.

En la nomo de la Centra Popola Registaro de la Popola Respubliko de Ĉinio mi deklaras, ke la deklaro de Truman je la 27a de junio kaj la agoj de la usona militŝiparo estas armita agreso kontraŭ la teritorio de Ĉinio kaj ĝisfunda malobeo al la Ĉarto de la Unuigitaj Nacioj. Ĉi tiu perforta raba ago de la usona registaro ne estas surprizo al la ĉina popolo sed nur pliiĝas ilian koleron; ĉar la ĉina popolo, dum longa periodo, konstante malkovris ĉiujn konspiraĵajn planojn de usona imperialismo por agresi Ĉinion kaj alproprigi Azion perforte. Ĉio, kion faras la deklaro de Truman estas nur senkaŝe malkovri sian antaŭdeciditan planon kaj ĝin efektivigi. Fakte la atako de la pupa Korea Registaro de Syngman Rhee al la Korea Popola Demokratia Respubliko instigita de la usona registaro estas antaŭdecidita paŝo de Usono, kies celo estas krei pretekston por Usono invadi Tajvanon, Koreion, Viet-Nam-on kaj la Fili-

pinojn. Ĝi estas precize plua paŝo de interveno de usona imperialismo en la aferoj de Azio.

En la nomo de la Centra Popola Registaro de la Popola Respubliko de Ĉinio, mi deklaras ke, kion ajn obstrukcan agon faras la usonaj imperialistoj, la fakto ke Tajvan apartenas al Ĉinio estos neniam ŝanĝebla. Tio estas ne nur historia fakto; ĝi estas ankaŭ konfirmita de la Kajro- kaj Potsdam-Deklaroj kaj la situacio depost la submetiĝo de Japanio. La tuta popolo de nia lando certe batalos ĝisfine unuanime por liberigi Tajvanon el la mano de la usonaj agresantoj. La ĉina popolo, kiu venkbatis japanan imperialismon kaj Ĉiang Kai-sek-on, la lakon de usona imperialismo, sendube venke forpelos la usonajn agresantojn kaj reakiros Tajvanon kaj ĉiujn aliajn teritoriojn apartenantajn al Ĉinio.

La Centra Popola Registaro de la Popola Respubliko de Ĉinio alvokas ĉiujn popolojn tra la mondo kiuj amas pacon, justecon kaj liberon kaj precipe ĉiujn subpremitajn naciojn kaj popolojn de la Oriento; ke ili levigu kiel unu homo kaj haltigu la novan agreson de usona imperialismo en la Oriento. Tian agreson ni povas plene venkbati, se ni ne cedas al minacoj sed decideme mobilizas la vastajn amasojn de la popolo partopreni en la lukto kontraŭ la militfabrikantoj. La ĉina popolo esprimas siajn simpatiajn kaj respekton al la popoloj de Koreio, Viet-Nam, Filipinoj kaj Japanio, kiuj estas same viktimoj de usona agreso kaj estas same batalantaj kontraŭ ĝi. La ĉina popolo firme kredas, ke ĉiuj subpremitaj nacioj kaj popoloj de la Oriento sendube kapablas ĝisfine enterigi la feroceajn kaj malmortajn usonajn imperialist-militfabrikantojn en la grandiozaj flanoj de lukto por nacia sendependeco.

Tradukis Venlo Fon

Limigite de la spaco la anoncigitaj artikoloj "Kiel Ĉinio Konkeris Inflacion?" kaj "Ĉinaj Geknaboj en Liberiga Batalo" devas prokrastiĝi ĝis la venonta numero.

La Red.

Laboristoj Arde Amas Prezidanton Maŭ

(daŭrigo de p. 5)

min rekonsciigis per surverŝo de malvarma akvo. Ho, fratoj, ĉe tiel mi nenion eldiris!" Plue li daŭrigis, "Alfoje mi estis devigita labori ĉe Ŝeĥmen, unu el la okcidentaj urbopordoj de Pekino. En iu vespero la proksima arsenalo bruliĝis. Mi partoprenis la urĝan estingadon. Sed returnante mi renkontis japanan ĝendarmon. Li kaptis min dirante ke mi ekbruligis la arsenalon kaj direktis sian furiozan hundon min ataki ke la karno de miaj kruroj estis forŝirita. Ho, fraĵoj, mi jam estis mortanto kelkajn fojojn. Tute ekster mia imago ke mi povas vin vidi hodiaŭ, ke mi povas retrovi la patrinon. Prezidanto Maŭ min savis. Ni neniam devas tion forgesi." Li malbutonumis la superveston kaj suprenvolvis la pantolon-krurumojn. Ĉiuj ĉe la kunveno fikse rigardis la cikatrojn kun ploro rugiĝintaj okuloj. Sur la brusto ankoraŭ klare restas kvar najlunitaj signoj kaj sur la mord-

itaj kruroj estas multe da blurugaj cikatroj. Rigardante la plorantajn kunlernantojn. Vang Teh-ju diris: "Ne pluru, fratoj! Ni estas jam mastroj de la ŝtato dank' al la gvido de Komunista Partio kaj Prezidanto Maŭ. Kaj nun mi jam honore partianigis, trovis mian intimulon! Ni devas ĝisfunde reformi la malnovan socion!" La sanga historio en la pasinto klare sin prezentis en la cerbo de la laboristoj. Dank' al la eltrovo de la deveno de la pasinta doloro kaj la nuna ĝojo plue kreskigis ilia arda amo al frukto de la revolucio. La laboristoj diris: "Se Prezidanto Maŭ ne gvidus nin revolucii eklevinte la ruĝan flagon sur Ĝingkang-Monto", kiel ni povas esperi la hodiaŭan staton?" Post la plendo la laboristoj fariĝis pli klarvidaj kaj pli arde amas la Komunistan Partion kaj Prezidanton Maŭ. Multaj el ili petis akcepton de la partio. En la plenda kunveno iu laboristo skribis en intimaj vortoj slip-

on al respondeculo de la trejnejo por peti viziton al Prezidanto Maŭ. La slipo legiĝas jene:

"Nia kara k-do Maŭ, la prezidanto de Komunista Partio, gvidis la sangan batalon sur neĝaj montoj kaj ŝlimaj stepoj. Li scias la doloron de siaj gefiloj, tial li esperas nin plendi, ke li nin aŭdu kaj gvidu nin vengi. Ni vivis en lia sino ĝis nun. Ni volas vidi la karan patrinon. Ni opinias, ke ankaŭ la patrino volas vidi siajn gefilojn. Sufiĉus ĉe unu minuto. Tio nin honoros kaj pruvos, ke ni ne vivas vane, ĉar ni ja vidos nian patrinon propraokule."

Trad. Honfan

*Ĝingkang-monto: monto en Ning-kang-Gubernio en Kiangsi. Post la perfido de Kuomintang kontraŭ revolucio en 1927, K-do Maŭ Ze-tung ekorganizis ruĝan armeon por milito kontraŭ batali la reakcian forton. Je la 12-a de septembro li sukcese atingis Ĝingkang-monton kaj tie startigis la unuan bazon por ĉina revolucio.

la trad.

ORIENTE RUĜAS SUN'

Popolkanto en norda parto de Senci-Provinco

Esperantigis Honfan

Harmonio de Ho Lu-ting


Jenĉienhu Konkeras Malsaton dum Inundo

Ven Ĉaŭ

Jenĉienhu, vilaĝo ĉirkaŭ 60 kilometrojn nordoriente de Tienzino, estas tipa el miloj da malgrandaj komunumoj tra tuta Ĉinio, kiuj jam ellernis konkeri malfeliĉon per kolektiva lukto. Ĝia batalo, lastjare, kontraŭ malsato estis tre energia kaj akra, sed la kamparanoj nun povas rigardi trans la kampoj kaj scias ke iliaj grenujoj denove pleniĝos post kelkaj semajnoj. Ĉiuj komprenas, kiel Ĵen Ĵen-lin diris, ke nur dank' al la helpo de la Popola Registaro kaj la senĉesa penado de la kamparanoj mem, ĉiĉfoje ili sukcesis superi la malfacilaĵojn. Antaŭe en tia okazo ili povis nur toleradi, kredante ke ĉion jam antaŭdecidis la Sorto.

Lastjare Ĵen Ĵen-lin plej frue finis la printempan plugadon. Antaŭe sub la reĝimo de la Kuomintang-reakciuloj, krom malsato kaj malriĉo nenio rezultis el lia diligenta laboro. Nun, post la agrara reformo kaj kun la posedatestiloj de kelkaj novaj terpecoj en sia poŝo, li scias ke la fruktoj de sia penado estas garantiataj, kaj li laboras pli diligente kaj entuziasme. Li plugis ne nur sian propran teron sed ankaŭ nekulturitan teron pli malproksiman de la vilaĝo. Lia edzino, liaj 14-jara filo kaj du plijunaj filinoj ĉiuj partoprenis en la laboro. Ilin kuraĝigas la registara dekreto, kiu legiĝas: "Nove kulturitaj teroj apartenas al la kulturo, kaj liberigas de terimposto por unu jaro". Laŭ la vortoj de 60-jara avino, "la tuta familio fervore laboradis kaj havis nenian tempon preparoli ion alian". Antaŭ la fino de la printempo, la familio Ĵen jam plantis 50 muojn da kaŭliang.

Tamen malfeliĉo vizitis la regionon unu post la alia. En majo, speciale varmegaj aerondoj ŝrumpigis la junajn germojn, kaj en julio, inundo de Ĉijun-Rivero kiu ĉirkaŭas la vilaĝon, forportis



Instali Spin-maŝinon

la duafoje plantitajn vegetaĵojn. Vane la tuta vilaĝo faris ĉion eblan por plifortigi la digojn, kiujn la kuomintang-armeo antaŭe multloke fosis por enlokiĝi pafilegojn. Venis subite pluvŝtormo, iu malforta parto de la digo cedis sub la premo de la leviganta tumulto rivero kaj torrente elfluis la riverakvo. La tuta regiono fariĝis lago kun la vilaĝo elstaranta en la mezo kiel insuleto. Konsekvence estiĝis grava problemo de grenprovizo en la vilaĝo.

La kompartianoj kaj la vilaĝaj kadroj tuj alvokis kunvenon. Estante unu el la laborantoj de la vilaĝa administrado, Ĵen Ĵen-lin ankaŭ partoprenis la kunsidon.

Peza atmosfero kun zorgemo kaj nervstrĉeco intermiksita pleniĝis la ĉambron. Memoro pri la pasinteco restis klara kaj la novan rimedon oni ankoraŭ ne bone konis. La vilaĝa sekretario de la Partio pacience klarigis la situacion kaj elokvente ilin kuraĝigis. Ili ekvigligis en la diskuto pri proponoj por pasigi la minacantan periodon de malsato. Ilia plano estis poste aprobita de la amasa kunveno de la 136 familioj en la tuta vilaĝo. Antaŭ ol flankaj aktivoj estis organizitaj, la vilaĝanoj devis kolekti sovaĝmilion por manĝi kaj falĉi herbon por vendi al la proksima urbeto kiel hejtajojn.

Post kelkaj tagoj Ĵen Ĵen-lin portis 100 ĝinojn (50 kilogramojn) da sekigita herbo al la merkato kaj ĝin vendis por kelkaj ĝinoj da greno. Post tiam li iris al la urbeto ĉiutage kaj kolektis sovaĝan herbon kaj arbustojn ĉiuposttagmeze. Aliaj anoj de la familio kolektis sovaĝan milion. Tiel la Ĵen-familio akiris sian ĉiutagan panon kaj eĉ povis iomete ŝpari por rezervo.

Je la fino de aŭgusto, tamen, ĉiom da sovaĝmilio estis finkolektita kaj eĉ sovaĝa herbo fariĝis malmulta. Plufoje tra la vilaĝo ŝvebis sento de melanĉolio.

La vilaĝa sekretario de la Kompartio ankoraŭfoje alvokis kunvenon. Li raportis pri rimedopleneco de vilaĝanoj en aliaj afliktitaj regionoj. Montlogantoj falĉis medicinan herbon por vendi al farmaciistoj; popolo apud la maro ekstraktis vendeblan ĥemiaĵon el marakvo; en iuj lokoj, vilaĝanoj kaptis fiŝon el siaj inunditaj kampoj.

Je ĉi tiu punkto, Ĵen Ĵen-lin interrompis la raporton per ekkrio, ke li ja kelkfoje vidis fiŝon en siaj superakvigita kampoj. Komenciĝis diskuto pri fiŝkaptado. En la amaskunveno fiŝkaptado kooperativo estis iniciatita de 94 familioj, kiuj kontribuis po kvar ĝinoj da kaŭliang kaj ok horojn da laboro potage. Ili provis ĉiel sinhelpi antaŭ ol peti helpo de la registaro.

Ĵen fariĝis membro de la kooperativo kaj lia filo, laŭ la laborokapablo, fariĝis duona membro.

La vilaĝanoj estis mirigataj kaj gojigataj, kiam ili trovis ke la ĉiutaga kapto sumiĝis je 1,500 ĝinoj. La kooperativo establis vendan sekeion, interŝanĝis grenon per parto de la rikolto kaj disdonis al ĉiu membro lian ĉiutagan porcion. La avino ĝoje komentis: "Antaŭe, dum inundo, la fiŝo vivtenis per ni, sed nun, ni vivtenas per fiŝo".

Je la fino de septembro malprospiriĝis ankaŭ la fiŝkaptado, ĉar komencis retiriĝi la superakvego. Tamen la vilaĝanoj trovis novan laboron en la konstruado de domoj en proksima ŝtata farmo. Tiel la vilaĝanoj sukcesis sin vivteni ĝis decembro, kiam neĝego malebligis la konstruadon.

La familio Ĵen restis senlabora por iom da tempo kaj ilia rezervo de greno minace malgrandiĝis. Tra la vilaĝo regis denove melanĉolia atmosfero. Ĉiuj fariĝis malbonhumoraj kaj kveroloj eksplodis je la plej eta malkonsento.

La vilaĝestro iris al la distrikta ĉefoficejo por peti instrukcion. Li revenis kun la kuraĝiga informo ke la registaro pretas pruntedoni al Jenĉienhu-vilaĝo 10 maŝinojn por teksu pajlosakojn, kaj ŝtata komerckompanio



La Registaro Pruntedonas al la Kamparanoj Kotonon por Fadenŝpinado dum Malsato

aĉetos ĉiom, kiom ili produktas, per kontanta mono.

Interhelpaj grupoj estis starigitaj por la entrepreno. Ambaŭ Ĵen kaj lia edzino partoprenis la laboron, kaj iom poste ankaŭ la filo. Ĝis la fino de januaro, ili jam perlaboris 400 ĝinojn da kaŭliang, sufiĉe por nutri la tutan familion dum la kriza vintra periodo.

Ĝis la mezo de februaro ĉiu familio en Jenĉienhu-vilaĝo estis organizita en iun grupon de ne-agrikultura produktado. Nun jam funkciis 48 sako-teksaj maŝinoj kaj aliaj manŝpinaj produkt-unioj.

Printempa plugado estis la sekvanta problemo. La vilaĝanoj ne sciis kiel plenumi la laboron sen ĉeso de la flankaj laboroj, kiuj ja donis al ili la ĉiutagan enspezon. Troviĝis nur unu selvo—plua interhelpo.

Interhelpaj grupoj estis aranĝitaj

inter la familioj por ke parto de la anoj kulturu kaj alia parto restu ĉe la flankaj laboroj. Ili sukcesis per ĉi tiu rimedo planti 320 muojn da frue matura tritiko kaj 300 muojn da kaŭliang. Alia laboro kiel sarkado estis plenumita en la sama kunlabora maniero.

Bona rikolto estas atendata de la vilaĝanoj de Jenĉienhu. Ĉijare ili ne timos la someran inundon, ĉar la registaro jam plenumis grandskalan akvokonservan projekton, kiu subigis Ĉijun-Riveron al kontrolo.

Same kiel inundo jam fariĝis afero de pasinteco por Jenĉienhu-vilaĝo, tiel estis la minaco de malsato. La politike vekigitaj kamparanoj de Ĉinio jam ellernis konkeri naturan malfeliĉon per sia propra kolektiva penado.

Mallongige Tradukis
Censinio

LA ORGANIZO KAJ ĈEFAJ RESPONDECULOJ DE LA CENTRA POPOLA REGISTRARO DE LA ĈINA POPOLA RESPUBLIKO

Antaŭ ol la kunvoko de la Tut-Ĉinia Popola Kongreso per universala voĉdono, la Plena Kunsido de la Ĉina Popola Politika Konsiliĝa Konferenco plenumas la funkciojn kaj uzas la povon de la Tut-Ĉinia Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko, elektas la Centran Popolan Registraran Konsilon de la Ĉina Popola Respubliko kaj donas al ĝi aŭtoritaton uzi ŝtatan povon.

La Centra Popola Registrara Konsilo (prezidanto: Maŭ Ze-tung) reprezentas la Ĉinan Popolan Respublikon en internaciaj rilatoj kaj gvidas la ŝtatan aparaton enlande.

La Centra Popola Registrara Konsilo starigas: la Registraran Administran Konsilon (ĉefministro: Ĉou En-laj) kiel

la plej altan administran organon; la Popolan Revolucian Militan Konsilon (prezidanto: Maŭ Ze-tung) kiel la superegan militan povon de la ŝtato; kaj la Superegan Popolan Juĝejon (prezidanto: Ŝen Ĉun-ĵu) kaj la Popolan Ĉefprokuroran Oficejon (ĉefprokuroro: Lo Ĵung-huan) kiel la plej altajn juĝan kaj kontrolan organojn.

La Registrara Administra Konsilo starigas Komitatojn de politikaj kaj Leĝaj Aferoj (prezidanto: Tung Pi-vu), de Financaj kaj Ekonomiaj Aferoj (prezidanto: Ĉen Jun), de Kulturaj kaj Edukaj Aferoj (prezidanto: Kuo Mo-fo), de Popola Kontrolo (prezidanto: Tan Ping-ŝan), kaj starigas Ministeriojn, Komisionojn, Akademion, Administraciojn, kaj Bankon.

Moderna scienco enkondukigis en Ĉinion nur en la lastaj 40 jaroj. Ekde 1916, sciencaj esplor-institutoj fondiĝis unu post la alia. Kaj sciencaj esploro iom post iom akiris lokon en universitatoj. Dum 31 jaroj de post la "Movado de 4a, Majo", 1919, en Ĉinio aperis kelkaj talentaj sciencistoj, kiuj faris individuajn kontribuojn al la studado de scienco kaj estas nun jam internacie famkonataj. Tamen ili faris malmulte en la plialtigo de la bonstato de la popolo kaj en la antaŭenigo de scienco. La reaktiva Kuomintang-Registaro neniam donis kuraĝigon al scienco kaj rigardis ĝin kiel nuran ornamentojn. Sektanismo regis en la sciencaj organizaĵoj kaj la plejmulto el la sciencistoj havis konfuzitan ideologion de "scienco por scienco mem". Por akiri ĉiurilatan plibonigon de la laboro kaj vivo de la ĉina popolo, sciencaj esploro devas esti direktita al la bezono de agrikulturo, industrio kaj publika sano. Ni devas direkti sciencojn laŭ la linioj, kiuj efektive servas la kamparanojn kaj laboristajn amasojn. Ni devas organizi niajn kolektivajn sciencajn penadojn por solvi la plej urĝajn kaj esencajn problemojn, kiuj staras antaŭ ni. Ni devas eduki grandan nombron da novaj sciencaj laborantoj por la konstruo de moderna kaj industria Ĉinio.

Tiuj ĉi taskoj nur povas esti plenumitaj per tutlanda kaj longtempa planado. Sovetio estas la sola lando en la mondo, kie la progreso kaj popularigo de scienco estas efektivegita kun plano kaj sukceso. Ĉinio estas pli postlasita en siaj industria produkto, amasa eduko kaj ĝenerala vivkondiĉoj ol Rusio antaŭ la Oktobra Revolucio. Tial ekstreme malfacila estas la tasko altigi produkton, nenigi analfabetecon kaj konstrui novan Ĉinion. Tamen la Popola Registaro jam emfazis la gravecon de antaŭenpuŝo de scio, kaj de disvolvigo de sciencaj esploro. Kvankam Tajvan (Formoso) ankoraŭ ne estas liberigita kaj staras antaŭ ni ankoraŭ ekonomiaj malfacilaĵoj en 1950, la budĝeto de nia registaro por elspezoj en sciencaj esploro jam duobligis tion de la Kuomintang-Registaro antaŭ la milito.

La registaro organizis novan Academia-Sinica'n en lasta oktobro per kunigo kaj plilarĝigo de la malnova Academia Sinica en Nankino kaj la Nacia Akademio de Pekino. Dum la duonjaro de post tiam, 24 naciaj esploraj institutoj sub tiuj du akademioj estis reorganizitaj kaj amalgamitaj en 16 esplorajn institutojn. Ĉiu instituto nun havas sian propran sferon de respondeco kaj estas asignita sia rolo en la nacia ĉiufanka konstruo-programo.

Ekzemple, en fiziko, du antaŭaj institutoj, unu en Pekino kaj la alia en Nankino, neniam diferencigis sian laboron pasinte. Nun ili estis kunigitaj kaj reorganizitaj en du novajn institutojn. Unu el ili estas nomita Instituto de Moderna Fiziko specialiganta en la studo de tiaj larĝaj kaj fundamentaj subjektoj kiaj atoma energio kaj kosmaj radioj. La dua, Instituto de Aplikata Fiziko, dediĉas, precipe sian energion al optika esploro. Ĝi jam fabrikis optikajn partojn por 500 mikroskopoj kaj 200 teodolitoj. Ĝi funkcigas fakon por desegni kaj froti optikajn lensojn. Por certigi sufiĉan enlandan provizon de optikaj instrumentoj estonte, ĝi kunlaboras intime kun la fabrikoj de optikaj lensoj. La Instituto de Aplikata Fiziko ankaŭ elpensis novan metodon por fabriki kvareajn piezoalektrikajn kristalojn por stabiligo de frekvenco en radia disaŭdigo.

Por elradiki antaŭan duplikatecon kaj atingi efikan diviĝon de laboro, similaj rearanĝoj estis faritaj en la kampo de biologia esploro. Ŝanhajo kaj Pekino antaŭe havis kvin malsamajn biologiajn institutojn, kiuj laboris sendepende en siaj apartaj sed parte duplikataj kampoj. Nun tiuj ĉi kvin organizaĵoj estis kombinitaj en tri institutojn, ĉiu kun sia propra klare difinita sfero de respondeco. La unua estas la Instituto de Eksperimenta Biologio en Ŝanhajo asignita al studo de embriologio, sitologio kaj fiziologio per fizika kaj ĥemia principoj. La dua estas la Instituto de Hidro-biologio, ankaŭ en Ŝanhajo, specialiganta en la studo de fiŝoj kaj aliaj akvologiantaj estaĵoj. Tiu ĉi Instituto antaŭenlonge establis du eksperimentajn staciojn: unu en Ĉingtao kie oni studas maran biologion, kaj alia en Vuŝih apud la Taj-Lago en Kiangsu-Provinco, kie oni studas freŝakvan fiŝon. La tria de la novaj biologiaj organizaĵoj estas la Instituto de Sistema Botaniko, en Pekino, kiu kunordigos la laboron de ĉinaj kreskaj taksonomistoj kiuj sin okupas en la studo de ĉinaj kreskaĵoj. Specialan emfazon oni metos sur la studon de ekonomiaj plantoj kiel medicinaj herboj, paŝterboj kaj plantoj kiuj liveras latekson por fabriki kaŭĉukon. Du sciencistoj el tiu ĉi Instituto

am forveturis al Mukdeno kaj Harbino helpi al la nordorientaj provincoj por starigi iliajn botanikajn institutojn.

La aliaj esploraj institutoj ankaŭ adoptas siajn programojn al agrikultura, industria kaj medicina bezonoj de la lando. La Instituto de Organika Ĥemio en Ŝanhajo, ekzemple, helpis al la Orient-ĉina Buroo de Agrikulturo kaj Akvo-konservado en la preparo de organika hidrarga fungo-mortigilo, kiu detruos sporojn atakantajn kotonon kaj tritikon. La Instituto de Farmacia Ĥemio, ankaŭ en Ŝanhajo, helpis al la Popola Medicina Kompanio disvolvi procedon por kristaligi varmrezistan penicilinon. La Instituto de Geologio en Nankino sendis grupon de laborantoj al Nordorienta Ĉinio kaj okeidenta Hupej por esplori vejnojn de fero kaj karbo. La Pekina Instituto de Geo-fiziko donas mallongan duonjaran kurson al universitataj diplomitoj por eduki spertulojn, kiuj poste iros al Nordorienta Ĉinio por serĉi novajn mineralajn riĉaĵojn.

Scienco en Ĉinio ne plu estas apartigita kaj staranta malproksime de la ĝenerala publiko. Ĝi estas jungita por la utilo de la farmkampoj kaj fabrikoj—tiamaniere kunigante teorion kun praktiko.

SCIENCO EN NOVA ĈINIO

Koĉing Ĉu

Por ilustrati kiel efikas la kunlaboro de teorio kaj praktiko ni citas unu ekzemplon. Pingjuan-Provinco, nova provinco formita el antaŭaj suda parto de Hopej-Provinco kaj norda parto de Honan-Provinco, enhavas unu el la plej gravaj koton-produktantaj regionoj de Ĉinio. Por kelkaj jaroj, proksimume 1,500,000 akroj da kotonkampoj en tiu ĉi regiono estis serioze infektitaj de kotona afiso (*aphis gossypii glover*), konata kiel melona afiso en Ameriko kaj Eŭropo. Tiu ĉi plago malpligrandigis ĉirkaŭ trionon de rikolto. Estinte, entomologistoj kredis ke tiu ĉi kotona afiso vivis super la tero sur kelkaj parazitataj plantoj tra la jaro.

Post liberigo de Pekino, la Norda Ĉina Popola Registaro invitis Doktoron Ĉu Hung-fu, de la Instituto de Zoologio, kaj lian helpanton iri al la infektita distrikto por studi tiujn parazitajn. Post kelkaj monatoj da vojaĝo kaj esploro ili eltrovis ke kvankam la kotona afiso povas ekzisti sur pli ol 120 specoj de parazitataj plantoj en Norda Ĉinio, ĝi vivas ĝenerale dum vintro sur fikreskaĵo nomita *Ilex chinensis Versicolor*.

En vintro, la afiso ne vivas super la tero, sed alirobligas al radikoj kvin aŭ ses colojn sub la tero. Nur en marto aŭ en aprilo la afiso elvenas el la tero kaj migras al la juna kotonplanto je la unua ŝanco. Nun ĉar la viv-ciklo de tiu ĉi parazito estas konita, la eblecoj ĝin nenigi multe grandigas. La Academia Sinica, kunlaborante kun la Ministerio de Agrikulturo, komencis furiozan kampanjon kontraŭ tiu ĉi plago. Antaŭgardaj rimedoj estas provataj nun en Pingjuan-Provinco, kaj sukcesinte, estos provataj en aliaj partoj de Ĉinio.

Sed Academia Sinica kaj ĝia komponantaj institutoj nekapablas antaŭenigi sciencojn en Ĉinio solaj. Nur per la kunordigitaj penadoj de Ĉiuj ministrioj, universitatoj kaj aliaj sciencaj institucioj laborantaj sub la gvido de unu sistema ampleksa projekto, la celo povos esti atingita.

La Centra Popola Registaro nun dediĉas grandan energion al la tasko organizi ĉinajn sciencistojn. En julio, 1949, la registaro alvokis preparan kunvenon en Pekino por projekti tutĉinan konferencojn de sciencaj laborantoj. Ekde lasta decembro, multaj ministrioj de la nova registaro okazigis naciajn

konferencojn diskuti tiajn subjektojn kiel manĝaĵo-produkton, ŝtaloprodukton, terkonservadon, hejtajn, fiŝkaptadon, k. t. p. Specialistoj el ĉiuj partoj de la lando renkontis ĉe tiuj ĉi konferencoj por signi detalajn planojn por ilia estonta laboro.

En pasinta Kuomintang-reĝimo, la rezultato de tiaj kunvenoj de sciencistoj kaj aliaj specialistoj estis nur amaso da rezolucioj neniam plenumitaj. La stato estas tute alia hodiaŭ. Nur proponoj, kiuj povas esti efektivegita estas skribitaj sur la agendo. Ĝiaj decidoj estas rapide kaj efike plenumitaj post la kunveno. Ekzemple, je la fino de la lasta februaro, grupo de geologoj estis alvokitaj al Pekino: Ĝi bezonis nur du semajnojn por plani la programon de 1950 kaj difini respondecon de tersplora laboro en diversaj regionoj por diversaj sciencaj unuoj. En la periodo de unu kaj duona monato post la kunveno 80 geologoj ekveturis al Nordorienta Nordokcidenta kaj Centra Ĉinio por studi la geologian strukturon de tiuj ĉi areoj kaj esplori vejnojn de fero, karbo, oleo kaj ceteraj nemetalaj mineraloj.

Plue, por kuraĝigi la sisteman kaj kolektivajn antaŭenigon de scienco, la popola registaro penadas popularigi sciencan scion inter la amasoj. La Buroo de Popolara Scienco, sub la Ministerio de Kulturaj Aferoj, aranĝis grandan ekspozicion de populara scienco en Pekino dum la libertagoj de Nova Jaro laŭ la luna kalendaro. Tio altiris la atenton de pli ol 100,000 vizitantoj en 12 tagoj. La registaro mobilizis sciencajn laborantojn por iniciati multajn novajn teknikajn gazetojn, doni lekejojn kaj radio-disaŭdigi popularigitan sciencojn, kaj iri al fabrikoj kaj al la kamparo por studi la praktikajn problemojn kiuj bezonas solvon.

La antaŭenigo de scienco en Ĉinio prezentas al ni ankaŭ alian urĝan taskon—la trejno de sciencaj kadroj. Ekzemple, la rekonstruo de Nordorienta Ĉinio estas nun antaŭeniranta. Sed en ĉiu kampo oni sentas mankon de bone trejnitaj sciencaj laborantoj, teknikistoj kaj maŝinistoj. Kvankam la Nordorienta Registaro klopodas plibonigi la situacion varbante specialistojn el ĉiuj partoj de Ĉinio, la manko ne povas esti tute venkita, pro la limigita nombro de tiaj spertuloj en Ĉinio. Post kiam liberigos Tajvan (Formoso), la tuta lando tuj entreprenos grandskale rekonstruan programon tiam pli urĝos la postulo de sciencaj kaj teknikaj laborantoj.

Tial la registaro projektas establi multajn novajn edukajn centrojn en la proksima estonto, kaj ĝi emfazas ke estas necese pliampleksigi la sciencajn fakojn en niaj nunaj universitatoj kaj kolegioj. La registaro ankaŭ projektas krei vastajn edukajn faciligojn en la kampo de populara scienco. Krom preparado de landskala kampanjo por elradiki analfabetecon, la Ministerio de Edukado de la Centra Popola Registaro projektas malfermi multajn lernejojn por laboristoj kaj kamparanoj, por doni al ili mallongajn kursojn de scienco kaj teknologio.

Kiel la Komuna Programo de Ĉina Popola Politika Konsiliga Konferenco deklaris ke amo de scienco estas unu el la kvin virtoj, kiujn ĉiu patriota ĉino devas kulturi. Amo de scienco signifas ke oni devas scienca trakti ĉiujn problemojn en ĉia ajn afero, ĉu persona, ĉu apartenanta al ŝtata administrado, ĉu restarigo de komunikado, stabiligo de varprezoj, k.t.p.—devas esti rigardataj el sciencaj vidpunktoj, kaj devas esti administrata per sciencaj metodoj. Scienco en Ĉinio estas kiel transplantita frukta arbo. Ĝi velkis en la malfavora klimato de la estinto. Sed nun la klimato plibonigas kaj la tero fariĝas fekunda. Tial, ĝi baldaŭ enradikiĝos, kaj en ĝusta tempo ĝi ekfloros bele kaj produktos riĉajn fruktojn.

Trad. Howens

POPOLA MONDO

Dulingva organo de Ŝanhaja Esperantista Ligo.

Jarabono (12 numeroj) inkluzive sendkoston: US \$1.20 (aŭ egalvaloro).

Specimeno kontraŭ bildkarto aŭ 1 respond-kupono.

Adresu ĉion al Ŝanhaja Esperantista Ligo, Poŝtkesto 636, Shanghai, Ĉinio.

LABORISTOJ ARDE AMAS PREZIDANTON MAŬ

Pejlan

La Pekina Urba Komitato de Ĉina Komunista Partio nun grandskale edukas per kadrotrejnejo la partianojn kaj progresemlajn laborantajn en la ŝtataj fabrikoj kaj minejoj. Tio estas unu el la plej bonaj rimedoj por altigi la klaskonscion kaj firmigi la komunistan vivkoncepton de la partianoj. Ekde marto de lasta jaro tiu trejnejo aranĝis jam sinsekve kvin klasojn. Sume 4,133 lernantoj estas trejnitaj. El ili 3,321 estas laboristoj, konsistigante 80% de la tuta lernantaro. En la unuaj kvar klasoj 1,041 prominentaj lernantoj estas akceptitaj en la Partion. Tio kreis por la ŝtataj fabrikoj parton de la stabo.

Ĉiuj trejnitaj revenintaj al la fabriko pli bone laboris ol antaŭe. Multaj el ili partoprenis la laboron de sindikato kaj Nova Demokrata Junula Ligo. Plejparto el la trejnitaj laboristoj ludas modelan kaj avangardan rolon en la produktado. Ekzemple: Ŝi Taŝeng, grupestro de la Partio, kune kun la aliaj laboristoj ludas ĉefan rolon en la riparo de la No. 6 maŝino de Ŝihĉingŝan-elektrejo. Ĉi Ŝuangjung, laboristo de Liŭliho-a Cementa Fabriko, lernis dum trejnado kiel sinapogi sur la amaso. Post la reveno li estis elektita labor-direktoro. Li ĉiam diskutas kun la amaso por centrigi ĉies saĝon kaj disvolvi ĉies aktivecon, kiam li ricevis de supra organizo ian taskon. Antaŭe por fando de forno da fero almenaŭ unu semajno estas bezonata, sed nun 4½ tagoj sufiĉas. En la Sepdeka Arsenalo la plej alta rekordo en la taga produkto de kupra ingo por pumpilo estis kvar, sed Vang Ĉunŝeng, laboristo reveninte el la trejnado, altigis la tagprodukon ĝis naŭ. Kaj plie li helpis alian laboriston Vang Piĉang atingi la saman rekordon. Li Maŭtang, laboristo en la Tria Maŝinfabriko, reveninte el la trejnado, tuj altigis la noktoproduktan rekordon de ŝraŭboj de 60 ĝis pli ol 100 en la unua nokta deĵoro. Kelkajn tagojn poste li ĝin plialtigis ĝis 315, pliboniginte la instrumenton.

Kial tiaj neeblaĵoj en la pasinto kreigis hodiaŭ? La respondo ni povas trovi en la komparo de iliaj politikaj pozicioj kaj vivstatoj antaŭ kaj post la liberigo, kiel ili mem diris.

En la kvina klaso estas lernantino nomata Vang Ŝuĉen. 19-jara laboristino. Antaŭ la liberigo pro malriĉo ŝiaj gepatroj dufoje ŝin forvendis al bienulo kiel sklavino. Ekde la aĝo 12-jara ŝi laboris en iu arma vestproviza fabriko kaj spertis diversajn subpremojn kaj humiligojn. Sed post la liberigo de Pekino pro la entuziasmo en la laboro ŝi estis invitita kiel speciala delegitino en la Pekina Laborista Kongreso kaj poste elektita konstanta komitatano de la Pekina Sindikato. Tian brilan politikan pozicion ŝi ja neniam antaŭe eĉ ŝongis. Kuo Ju, laboristo de Mentoŭgoŭ-Minejo, nun havas trikapan familion. Lia monatsalajro atingis 330 ĝinojn da miligreno. Tio sufiĉas por provizi la familion du-trione per delikataj grenoj kaj trione per krudaj. Antaŭ la liberigo li laboris ankaŭ en tiu sama minejo. Sed lia salajro valoris nur du sakojn da faruno, kaj pro diversaj specoj de

eksploatado ekz. prokrasto de salajro. pago de la laborĉefo kaj kompenso por kroma greno kaj karbo ktp, fine li ricevis nur 1.16 sakojn da faruno. Per tiu ĉi sumo certe li ne povis vivteni la tiaman kvarkapan familion. Li do devis riski sian sanon kaj laboris 16 horojn ĉiutage. Eĉ tiel la patrino kaj la fratino ankoraŭ devis servi al aliaj per lavado. Sed apenaŭ du monatojn poste Kuo Ju malsaniĝis pro troa laciĝo. La patro mortis pro malsato. La patrino kaj la fratino do estis devigitaj reveni la naskiĝan lokon, kie same troviĝis neniŭ ĉambro kaj neniŭ sulko da tero apartenantaj al ili. La familio tiel disiĝis.

Ĉiu lernanto en la kadrotrejnejo havas historion pli-malpli similan al Vang Ŝuĉen kaj Kuo Ju. Sed antaŭe ili ne tre klare komprenis kiel ili malriĉiĝis, kiom el iliaj sangfruktoj estis ekspluatitaj de aliaj. En la trejnejo oni klarigis al ili pri funkcio de laboro en mondkreado, pri historia materialismo kaj Ŝtato kaj Revolucio ktp. por altigi ilian klasan konscion. En la lerno de klasbatalo la teorio de supervaloro estis akcentita. Detala kalkulado pri ilia laboro estis farita por ke ili komprenu kion el ilia propra laboro profitis ili mem, kaj kiom la aliaj. Krome por eviti la eventualan miskomprenon pri la novdemokratia ekonomio inter la laboristoj oni klarigis ankaŭ la socialisman karakteron de la ŝtataj entreprenoj kaj la politikon de bono al ambaŭ laboristoj kaj kapitalistoj.

Kalkulite laŭ la konto de Mentoŭgoŭ-Minejo de januaro ĝis julio en 1948 ĉiu laboristo estis ekspluatita en unu monato naŭ sakojn da faruno. Jan Ĝitung laborinte 28 jarojn en la minejo tiel estis ekspluatita pli ol 3,000 sakojn da faruno. Tiu ĉi sumo sufiĉas por la seskapa familio vivteni dudeknaŭ jarojn. Lu Maŭ laboris en la Sepdeka Arsenalo 31 jarojn, sed laŭkalkule nur kvar jarojn kaj ses monatojn da laboro li laboris por si mem. Tiuj ciferoj ege surprizis la lernantojn. Ekde tiam ili bone konis la sekreton de kapitalista ekspluatado.

Jaro da sperto en la trejnejo pravas ke movado plendi estas esenca punkto por plialtigi la laboristan klaskonscion. La kvina klaso ekde la 27-a de aprilo komencis tiun movadon. Vang Teh-ju, unu el la lernantoj, kun senlima indigno elverŝis sian dudekjaran doloron subpremitan en la korfundo: "Mi naskiĝis en Ŝunji-Gubernio malriĉa ekde la junaĝo. Mia patro estis agrokultura ĵardungito kaj apenaŭ povis sin vivteni. Post la eksplodo de rezista milito mi devigite de la turmentita stomako alvenis Pekinon kaj perlaboris la ĉiutagajn panojn en Tien-ĉiaŭ (Ĉiel-ponto, malriĉula kvartalo en Pekino). Foje la poliestro vidis min vestita en eluzita uniformo kaj kulpigis min la okavoja armeano. Li min kaptis kaj kuŝigis min sur benkon, kun la brusto kontraŭ kvar elstarantaj najloj. Oni ŝnurligis min je la kapo kaj femuroj kaj premadis min desupre per prem-tabulo. Kelkfojojn mi svenis sed la diabloj (daŭrigota sur p. 2)



Printempa Plugo

Ŝia Feng

PROVIZO AMASIĜU KIEL MONTJOJ

— Ĉang Ming-ĉjuan —

Ekster fenestro koko krias noktomezon,
En sonĝ' mi vidas monton da draŝita gren';
Kaj ĉlitiĝas kaj vestiĝas haste, kiam
En stal' antaŭmatene blekas la azen'
Mia unua filo nove edzigita
Dormas profunde post riglita pord',
La dua dekkvarjara, silentadas
Malgraŭ plurfoja voko en la kort'.

La tutan domon mi nun vekas fine.
Plugilo preta. Bovo sub la jug'.
Surkampe la matena brizo refreŝigas,
Kaj nigra tero molas kun abunda suk'.
Multe da homoj jam laboras sur la kampo
Kaj la laboro progresadas kun plenflug'.

De mateniĝo ni laboras ĝis tagmezo,
Kaj ĝis la sunkliniĝo al sudokcident'.
La plugiloj, fosiloj, ŝpatoj kaj semiloj
Ekbrilas fulme de momento al moment'.
Trrr! hot! hot! Hej ho! hej ho!
Ĉie homkrioj kaj vipklakoj gaje bruas.
Svito saturas tute la tolbluzon
Kaj de vizaĝo en la teron fluas.

Laboras mi ĝis sunsubiro,
Ĝis la ĉielo brilas de stellum'.
Mia edzino vokas min al vespermango.
"Hodiaŭ nokte", mi respondas, "mi finplugos
Nepre ĉi tiun pecon sub la bela lun'."
"Ŝajnas, ke plijuniĝas vi je tridek jaroj!"
"Kiam ja devus mi labori, se ne nun?"

La tero estas nia tero
Kaj nia estas la ĉielo.
Ĉu mi bedaŭrus pri la ŝvit' kaj fort'?
Mi nur atendas la alvenon de aŭtuno
Kune kun la superabunda gren-rikolt'.
Grenejoj superfluos, grandaj kaj malgrandaj,
Vazoj kaj kestoj, ĉiuj pleniĝos ĝisrandaj.
Rigardu!
Tritik', hordeo, kaŭliang, rizo, pizo,
Kotono kaj terpomo kaj maizo!
Mi volas,
Ke amasiĝu kiel montoj la provizo!

Trad. S. J. Zee

En la Vagonaro "Amaso"

Ŝih Kuo

La 21an de aprilo, ĉe la orienta stacio de Mukdeno mi suriris la vagonaron *Amaso* kaj veturis al Kirin.

Inter la duaklasa kaj la triaklasaj troviĝis vagono nek triaklasa nek duaklasa. Ĝi estis provizita de remburitaj seĝoj kaj litoj. Enlite kuŝis gravedaj virinoj aŭ du-tri-monataj suĉinfanoj. Mezaĝaj kaj junaj patrinoj sidis sur la seĝoj ludante kun siaj infanoj. Ili estis tiel komfortaj kiel hejme. Tiu estis la vagono speciale preparita por patrinoj kaj infanoj.

En la duaklasa vagono estis biblioteko, sur kies bretaro oni trovis librojn pri politikaj teorioj kaj bone konatajn verkojn de nuntempa literaturo, ekzemple: *Paĉjo Kiu*, *Kvardek Jaroj Apud La Blufornego* kaj ceteraj.

Ĉiu vagono estis provizita de disaŭdigilo, kiu dissendis de tempo al tempo la informojn de la vagonarestro. Kiam la vagonaro proksimiĝis al Fuŝun, li plifruge donis sciigon al la pasaĝeroj: La venonta stacio estas Fuŝun kie la trajno haltos 10 minutojn. Tiuj, kiuj volus elvagoniĝi bonvole pretigu siajn aĵojn antaŭe.

La vagonaro veturis rapide, la radoj rulbruis obstuze, kaj la vojaĝantoj sentis lacecon. En tiu momento la disaŭdiga aparato ekparolis refoje: Freŝan novaĵon mi raportas al vi, kamaradoj: nia armeo sukcese surterigis al Hajnan-Insulo. Tiu novaĵo entuziasmigis la pasaĝerojn en la vagonaro kaj ĉiuj ĝojkriis.

La vagonaro kuris tra la vastaĵo de la patrolando. Antaŭ la okuloj disvolviĝis ĝia printempa pejzaĝo. Verdiĝis la arboj kaj la herbaro. Liberaĵoj terkulturistoj laboris sur la kamparo. La envagano disaŭdigilo ekludis "Patrolandan Marŝon. Aŭdante la kantantan voĉon, kiu vibris de arda amo pri la patrolando kaj gloris la liberon kaj feliĉon, oni sentis des pli da intimo inter si. Nia popolo ankaŭ penegas je la konstruado por la libero kaj feliĉo de la patrolando kun plena memfido kaj espero.

La novaj impresoj en la vagonaro rememorigis min pri la trajnoj de la malnova Ĉinio en sia sufero antaŭ dek tri jaroj. Tiam ĉiu vojaĝanto spertis maltrankviliĝon kaj streĉitecon sur ĉiu ajn linio. Li timis suriri la malgustan vagonaron, preteriri la celtan stacion, perdi pakajojn, aŭ ofendi la fervojajn policeanojn kaj oficistojn. En iu stacio en Sudmanĉurio mi vidis la fervojajn oficistojn sub la komando de la japana imperiismo desegnantaj ciferojn per kredo sur la dorso de la vojaĝantoj, ke ili ricevu biletojn laŭnumere. Oni sentis en tio indignon kaj humiliĝon. Sur Pepin-Hankou-linia vagonaro mi vidis kuomintangajn fervojajn oficistojn bati kruele pasaĝeron, kiu perdis sian pakajon, kaj mi ankaŭ vidis fervojajn oficistojn de Jan Siŝan, multjara tirano de Ŝansi-Provinco, sur la Ĉen-Taja linio puŝi malsanulon el la vagono.

Sed *Amaso*, per kiu mi veturis, havas tian profundan amikecon kun la popolanoj.

La 23an de majo de la pasinta jaro kiam *Amaso* alvenis al Fuŝun, ĝi devis tranokti ĉe tiu stacio, ĉar elreliĝis la antaŭirinta vagonaro. Tiam ankoraŭ ne ekzistis restoraci-vagono sur *Amaso*. La manĝaĵoj kaj trinkaĵoj de la vendistoj jam elĉerpigis. Nur malsata kaj soifo atendis la pasaĝerojn. Jen demando por la vagonarestro: ĉu for-

lasi la amason aŭ servi al ĝi? La vagonarestro de la popola fervojo elektis la duan vojon. Li interkonsiliĝis kun la staciestro kaj mobilizis la familianojn de la staciaj laborantoj prepari rizkaĉon, pekilitan brasikon kaj bolintan akvon por la pasaĝeroj. La malfacilaĵo tiel forigis. Tamen nova problemo prezentis sin. La vojaĝantoj, kiuj devis transvagoniĝi ĉe Mejhokou, povis maltrahi la difinitan horon. Ili tre maltrankviliĝis. La vagonarestro tion rimarkis kaj dediĉis grandan atenton al ĝi. Li konsiliĝis telefone kun la Mejhokou-Stacio kaj petis instrukcion al la supera organizo. La problemo solviĝis kaj la pasaĝeroj ĝojegis. Kiam la vagonaro alvenis Mejhokou-on, la vojaĝantoj, kiuj devis ŝanĝi vagonaron, suriris alian sen malhelpo. Starante sur la ŝtupetoj aŭ ĉe la fenestroj ili sekvis per rigardo la malrapide forirantan *Amaso*-n kaj ĝojkriis: "Ĝis revido, *Amaso*! Ĝis revido, vagonarestro!"

La 30an de junio de la sama jaro, kiam *Amaso* veturis inter Ĉingjuan kaj Ing'ngemen, gravedulino estis akuŝonta. Jen problemo inter vivo kaj morto. Ĉiuj en la vagonaro ekstreĉiĝis. La vagonarestro varbis kuraciston per la disaŭdigilo. Jen prezentis sin sindona flegisto kaj maljuna virino proponis sin kiel helpanto. Oni portis la akuŝontinon en alian vagonon kie ŝi akuŝis senpene. Por ŝi la vagonarestro preparis bolintan akvon kaj aĉetis ovojn. Kiam la trajno alvenis al Mukdeno, li skribis leteron kaj petis pasaĝeron kiu loĝis tie akompani ŝin al ŝia hejmo. Ŝia edzo estis multe tuŝita. Li iris al la stacio por danki la vagonarestro, kaj diris je la ekvido: "Ĉiuj laboristoj (li estis ŝtalfandisto) apartenas al la sama rondo familia, mi nun pli bone komprenas ĝian signifon. Mi laboros pli fervore por rekompenci vian amikecon. Por ne forgesi la bonfaron de la popola fervojo, mi decidis nomi la infanon Ĉeseng (naskiĝinto en vagono)."

La 18an de oktobro, *Amaso* veturis sur la Mukden-Kirina linio. En triaklasa vagono estis bopatrino kaj bofilino kun sia infano. La bofilino veturis la unuan fojon per fervojo kaj ne konis ĝian regularon. Ŝi igis la infanon feki en kraĉujon. La maljunulino timis punon kaj malpacigis kun sia bofilino. Venis la vagonarestro. Li klarigis pacience la survagonan sanitariajn regulojn al la juna virino kaj ordonis vagonan laboriston purigi la kraĉujon. Ĉiuj pasaĝeroj diris ke li tre bone solvis la problemon.

La sukceso de la laborantaro de *Amaso* devenis de tio, ke ili elĉerpis sian sperton el la pasinteco. Tion montris la jenaj laborsistemoj:

1. La laborantoj formis grupojn kun difinitaj anoj el diversaj fakoj. La samgrupanoj kunlaboris interhelpe. Ili kunsidis antaŭ la veturo por diskuti pri sia venonta tasko kaj post la veturo por kontroli la laboron. Kelkafoje ĉe la mekanikisto aŭ la trafik-administranto partoprenis tiajn kunsidojn;

2. La samgrupanoj el diversaj fakoj dividiĝis en tri sekurecgrupeojn, kaj ĉiu respondis pri parto de la tuta vojaĝo. Samtempe ili interrilatis tre intime, ke la sekureco de la pasaĝeroj estu garantiita, la ekipaĵoj de la vagonaro ne difikiĝu kaj ŝteloj kaj aliaj akcidentoj ne okazu;

3. Kolektivismo de laborado. Kon-

oficon. Ĉiu samgrupano helpis la aliajn reciproke, ekzemple, la bilet-kontrolisto helpis la patrolon dum la esplorado, la vendistoj helpis la purigistojn, aŭ la valizoregistristoj helpis la transport-oficon ŝargi aŭ malŝargi;

4. Ofte troviĝis multe da senbiletaj vojaĝantoj kaj oni devis vendi biletojn en la vagonaro. Por eviti eventualajn miskalkulojn, oni kontrolis trifoje, t. e. la vagonarestro mem tuj kontrolis la kalkulon post la elvendo, poste kune kun la vagonara oficisto, kaj fine kontrolis ĉe la alveno al la fina stacio. Dank' al tio neniam okazis ia eraro. Nun la triobla kontrola sistemo jam adoptiĝas sur la tuta linio.

5. Dum la veturado la vagonarestro notis la laborstaton de ĉiu oficisto kaj raportis al la superuloj de la respektivaj fakoj. La estroj de la diversaj vagonaroj ankaŭ interŝanĝis siajn vetursperojn ĉe la renkontiĝo de la trajnoj. Kaj proponis demandojn aŭ donis solvojn inter si per surskribitaj etiketoj.

Antaŭe la fundamento de *Amaso* estis neniel bona.

Antaŭ la unua de majo 1949, la Fervoja Administracio de Nordoriento reordigis la vagonarojn kaj postulis, ke ĉiu sub-administracio devis elipari unu vagonaron. La tuta laborantaro de la kirina mekanika taĉmento penegis fari el malnovaj difektitaj vagonoj plene ekipitan pasaĝer-vagonaron, kaj ĝin solene nomis *Amaso* je la unua de majo. Ĝi estis metita sub la dispono de la kunrespondeca veturiggrupo de Li Ĉinghua. Komence la vagonoj estis tre maltaŭgaj. Sur granda parto de la fenestroj estis alnajlitaj lignotabuloj. Nur tri lampoj funkciis kaj la bilet-kontrolisto devis kunporti gaslampon. Nur tri kraĉujoj. Ne estis akvo por la lavopelvo kaj necesejoj. Ĝi ne havis duaklasan vagonon, nek litan nek restoracian. La varmtubaro ankaŭ malbone funkciis. En kelkaj vagonoj estis tiel varmege, ke oni ne povis surmeti vatitan vestaĵon, dum en aliaj oni tremis de frosto. La benkoj estis el lignaj tabuloj, kies najloj ofte kroĉe ŝiris la vestojn. La pli grava difekto estis ke la aksoj ofte ardiĝis. La vojo estis malbona kaj malbone interrilatis la laboro inter la diversaj fakoj. Ĉio tio influis la laboron kaj malebligis la akuratecon de la veturtempo. De Mukdeno ĝis Kirin ĝi veturis tridek horojn (nun nur 14 horojn kaj 39 minutojn).

Kune kun la disvolviĝo de la popola fervoja entrepreno, post longa kaj penega plibonigo, nun *Amaso* posedas dek vagonojn: 7 triaklasajn, 1 patrin-kaj-infanan, 1 duaklasan kaj restoracio kaj 1 ofice uzatan vagonon.

Ĝi havas radio-aparaton kaj envagongan disaŭdigilon, cirkulantan bibliotekon kaj kuracil-keston. Ĝi fariĝis jam la plej elstaranta el la kirin-fervojaj pasaĝer-vagonaroj.

Mi intervjuis Li Ĉinghua'n, la vagonarestro de *Amaso*. Li estas leĝanto de la urbo Kirin, dudek-sepjara, tre modesta kaj afabla. La vagonaraj oficistoj estas ĉiuj junaj, viglaj kaj gajaj. Inter ili estas junulo, nomata Sun Baŭŝeng, kiu estis tre riskema kaj petolema en la pasinteco. Li ŝatis suprensalti rapide kurantan vagonaron aŭ kuŝi inter la reloĵoj kaj lasi la trajno pasi super li. Pro lia riskemo kaj petolemo la vagonarestro timis kunlabori

kun li. Kiam li estis sendita al *Amaso* ĉiuj maltrankviliĝis pro Li Ĉinghua, timante, ke liaj agoj influus la laboron de la tuta grupo. Sed Li Ĉinghua helpis lin kun memfido, kaj pro lia pacienca edukado, Sun jam fariĝis fervora junulligano.

Li Ĉinghua diris ofte: "Mi laboras ok jarojn kiel vagonarestro, sed la unuajn ses jarojn mi pasigis sen klara konscio, nur en la lastaj du jaroj mi ekkonis, ke mia devo estas servi al la popolo." Jes, nur kiam li ekkonis sian devon servi al la popolo, la popolo ekkonis lin. Pasaĝeroj skribis 108 leterojn por laŭdi lian laboron.

Amaso kaj la Li Ĉinghua-veturgrupo kreis glorajn ekzemplon de la servado al la popolo. Ĝi progresigis la taskon de la vagonarestroj sur la tuta linio kaj puŝis antaŭen je unu paŝo la pasaĝer-trafikon sur la kirin-linio.

La Kirin-Fervoja Administracio oficiale laŭdis Li Ĉinghua'n kaj la tutan grupon kaj dufoje premiis lin. La 9an de marto de la kuranta jaro, ĝi oficialigis la Li Ĉinghua-grupon kiel bazan grupon de ferbovmovado.* La grupo akiris la unuan premion en la unua konkur-kunveno kunvokita de la Nordorienta Fervoja Asocio, la 15an de marto.

De 5a de februaro 1949 ĝis la 15a de marto 1950 *Amaso* veturis 90,000 km. kaj enkasigis 320,000,000 ĉinajn dolarojn de la senbiletaj pasaĝeroj.

Amaso ĉiam iris antaŭen. La sek-vanta stacio estis Kirin kaj mi baldaŭ finis mian 14-horan kaj 39-minutan veturadon. La vojaĝo estis tre edifa por mi. La vagonaro eniris la stacion, mi adiaŭis *Amason* kaj Li Ĉinghua'n, la vagonarestro. Rigardinte, ke la vagonaj oficistoj helpas la patrinojn kaj infanojn malsupreniri, mi eliris la stacion kune kun la aliaj pasaĝeroj, kiuj elvagoniĝis kun bona ordo.

Trad. S. J. Z.

* Fervojo estas nomo de iu vaganara lokomotivo en Nordorienta Ĉinio. Ĝi estas la plej bone funkciata de la fervojaj veturistoj kaj akiris plej altan rekordon en sekura kurado. Tial ĝia nomo uziĝas kiel nomo por modelaj lokomotivisto-grupoj, kiuj plej bone funkciadas la lokomotivon.

Jen La Vokoj al Vi!

- * Jaroslav Rygel, 20-jara komerca komizo, dez. kor. kun ĉinaj gekdoj, adreso: Ostrava 1, Nemocnični 15, Ĉeĥoslovakio.
- * Oficisto de Elektro-energia entrepreno kaj gvidanto de Esp-a kurso en la laborejo dez. kor. kun ĉinaj gekdoj. Adresu al: M. Mizuta, 45 Sumie Nishi-5, Sumiyoshiku, Osaka, Japanio.
- * 28-jara japana kompartiano ĉef-ingenero de sapa fabriko kaj komitatano de Osaka Filio de JEA dez. kor. pri politiko, teknikaĵoj problemoj kaj interŝanĝi librojn gazetojn, esp-ajojn kaj il. p.k. kaj p.m. kun ĉinaj komunisto-esperantistoj. Adreso: T. Takehana, 3449 Tennojica Abenoku, OSAKA, Japanio.
- * Ĉeĥoslovaka esperantisto, redaktoro de la ĵurnalo "Práca" volas korespondi kun koreaj esperantistoj pri aktualaj problemoj kaj kulturaj agadoj. Adresu al Imrich Zalupský, red. de "Práca", Košice, Benešova 31, Ĉeĥoslovakio.

TEATRO DE LA LABORISTOJ



La Laborista Amatora Dramgrupo en Ŝihĉiaĉuang Antaŭ la Prezento de "Ne Cikado".

La Muzoj nun loĝas sub la fabrikoj kamentuboj de Nova Ĉinio. Dramistoj, verkistoj, muzikistoj kaj artistoj en organizitaj grupoj, gvidataj de siaj asocioj, nun regule vizitas al la fabrikoj, uzinoj kaj minoj. Ili iras al ĉiuj industriaj urboj kaj centroj samtempe kiel lernantoj kaj instruantoj. Tie ili senpere studas ĉinian industrian vivon kaj helpas la laboristojn organizi siajn proprajn artajn kaj amuzajn aktivecojn.

Kiel rezulto de tiuj ĉi multflankaj kulturaj kontaktoj, literaturaj kaj artaj aktivecoj fariĝas jam nedisigebla parto de la vivo de la laboristoj. Verkado kaj prezento de teatraĵoj estas la plej grandaj plezuroj de la laboristoj. Riĉa drama talento estas trovita en la vicoj de la laboristoj. Kelkaj el iliaj teatraĵoj estas alte laŭditaj de la kritikistoj.

NE CIKADO, estas unu el la plej sukcesaj teatraĵoj verkita kaj prezentita tute de la laboristoj mem en la laborista amatora drama movado. Vej Lien-ĉeng, la aŭtoro, vagon-riparisto ĉe la Fervoja Fabriko de Ŝihĉiaĉuang ricevis nur kvar jarojn da elementlerneja edukado, sed li kompensis ĉi tiun mankon per sia krea talento kaj la riĉeco de siaj travivaĵoj. Post kiam li prove verkis du mallongajn teatraĵojn, *Ne Cikado*, lia lasta verko, en kvar aktoj kaj dek scenoj, pruviĝas arta triumfo.

Ĝi estas teatraĵo pri malprogresema laboristo, Ma Ŝen-paŭ, kiu amikiĝas kun aro da mallaboremuloj. Ŝajngigante sin vundita, li rifuzas labori. Lia edzino, kolerigita, forlasas lin. Lia patro, estro de iu kamparana asocio, lin vizitas, naŭzigas je la konduto de sia friponeca filo kaj rifuzas lin helpi. Super ĉio ĉi oni priiras lian domon.

Meze de liaj malfeliĉoj Maŝinisto Paj, modela laboristo kaj ano de la Komunista Partio, venas lin helpi kaj finfine sukcesas lin reformi.

Priskribante kiel la ideo de lia teatraĵo ekvenis al li, la laborist-dramisto skribis: "Unu tagon, post tagmanĝo, ni, sidante sub la arboj, diskutis nian laboron. Cikado kantis super ni tiel maltrankvilige ke ĉiuj ĝin malbenis. Post kelkfojaj netolereblaj ripetoj, unu el ni suprenrampis la arbon kaj ĝin kaptis. Tiam mi pensis, 'Kia malsagulo la cikado estas, sidante kaj kantante tie tra la tuta tempo! Se ĝi estus tiel laborema kiel abelo, oni lin amus.' Nur tiam, mi ekpensis pri la temo. Sed mi ne volis nomi kamarado-laboriston cikado, tial mi nomas mian teatraĵon *Ne Cikado*. Kun la ĉefa temo en mia kapo, mi prenis la okazaĵojn de la teatraĵo el nia propra fabrika vivo."

Ne Cikado estis frapanta sukceso, kiam

ĝi estis unufoje prezentata de la laborista drama grupo kun Vej Lien-ĉeng mem ludanta la rolon de maŝinisto Paj. Kiam prezentita ĉe la Pekina Junulara Palaco, teatraj kritikistoj, enhavantaj la Direktoron de la Centra Drama Akademio, Oŭjang Ju-ĉien, laŭdis ĝin kiel "represanta kreaĵo de la laborista drama arto."

MALŜARĜO, mallonga kvardekminuta teatraĵo, verkita kolektive de grupo de doklaboristoj en Dajren, estis alia freŝdata sukceso. Ĝia unufoja prezento en la Laborista Drama Konkurso de la distrikto Port-Arturo kaj Dajren (kie 39 aliaj teatraĵoj estis prezentataj) elmontris ĝian grandan forton kaj poezion belecon. Ĝi gajnis specialan premion, kaj estas publikigita en la Literatura Gazeto, organo de la Tut-Ĉinia Asocio de Verkistoj kaj Artistoj.

La intrigo estas simpla. Movado por superi industriajn rekordojn estas disvastiganta kaj la doklaboristoj, konsciaj pri la plibona vivo alportita de la liberigo, garantias superi la rekordon de malŝarĝato. Unu grupo de doklaboristoj akiras novan rekordon per pli racia divido de laboro kaj aliaj grupoj estas ekscititaj ĝin superi. La kvara kaj lasta sceno estas danedramo de laboro. La doklaboristoj prenas siajn laborajn poziciojn kaj komencas malŝarĝi kolosan ŝtipegon el ŝipo lignoŝarĝata. Ili laŭte kantas siajn popularajn laborritmojn kaj la prezento atingis dramatan klimakson de movo kaj sono. Finfine ili surterigas la ŝtipegon teren.

Tiu teatraĵo estis konstruita el la materialoj de doklaborista vivo mem, sekve ĝi interesas la ĝeneralan publikon; ĝi respegulis ilian propran kulturon kaj impresas la aliajn per la majesteco de ilia laboro. Al la doklaboristoj mem, ĝi havas la ĉarmon de la familiara vivo vidata en nova lumo. Ĝia poezia forto donis al ili novan koncepton al ilia vivo kaj laboro. La agado de la labora sceno montris ne nur korpan belecon, sed ankaŭ kolektivan forton.

Laŭ la Literatura Gazeto, *Malŝarĝo* ne nur elmontris al ni la laboran konsecon de la ĉina laborista klaso; ĝi ankaŭ markas la komencon de la nova kultura konseco de nia laboristaro."

Laboristoj en Tangŝan, Hopej-Provinco, antaŭnelonge ankaŭ recenzis sian dramatan arton. Tri teatraĵoj, tri muzikaj dramoj kaj unu danca ensemblo estis prezentitaj de ses fabriklaboristoj kaj ministaj dramaj kluboj. En sia teatraĵo, *Rilato Inter Urboj Kaj Kamparoj*, la laboristoj de la Hua-Sin-Teksejo drame priskribis sian viziton al distrikto dezertigita de superakvo kaj la kamparanan heroan bataladon en la movado "Helpe per Produktado". La Tangŝan-Fervoja Fabriko prezentis kvin kuraĝaj laboristoj. kiu estas vera epizodo pri riparo de fulmoforigilo supre de alta fabrika kamentubo, dum la Kajlan-ministoj prezentis la Ĉina-Sovieta Amikeca Jangko-Danco por celebri la kontrakton inter la du grandaj landoj.

Trad. Samino

La Tri Senrivalaj Bravuloj

(Daŭrigo de p. 8)

Ili kuris al la batalkampoj kiel dek fajrosagoj. La politika direktoro alrampis por ilin rigardi per propraj okuloj.

"Ordonu, ĉefo!" diris Li Ĉanhu. "Ĉu niaj suferitaj ofendoj restu nevenĝitaj!"

Jan Ĉengfu partoprenis en la eksploda grupo kaj prenis sur sin la taskon fari por la trupo trabeĉojn. Li kuris antaŭen kun pakajo da dinamito. La tuta grupo kuŝis sur la tero kaj rigardis al li. En interspaco de kelkdek paŝoj de la celita loko li ekfalis teren. Antaŭ ol Li Ĉanhu eldiris ion, Malgranda Ĉaŭ pafis antaŭen de apud li kiel sago. Nur du paŝojn for de Jan Ĉengfu li falis ankaŭ. Li provis plu rampi, sed la malamika pafado baris al li antaŭeniron. Ĉion ĉi vidis Li Faho. Pafis ambaŭ flankoj reciproke kaj kugloj karambolis kun kugloj. Li subite parolis al la grupestro:

"Donu aŭtomatan pafilon kaj konfidu al mi la taskon. Mi savos ilin. Mi ne revenos, se mi ne povos plenumi la taskon."

Laŭkutime oni ne povas riski en tia streĉa cirkonstanco. La rigardoj de la tuta grupo sekvis ĉiun lian movon. Li jen kuŝiĝis, jen rapide kuris. Ĉiuj grupanoj retenis sian spiradon en streĉo. Fine Li Faho atingis la celon kaj kuŝiĝis apud Jan Ĉengfu. Li Ĉanhu forviŝis la ŝvitogutojn sur la brovoj kaj daŭris rigardi. Ĉiuj tri povis nek antaŭeniri nek reiri, kvazaŭ kugloj obstrukcitaj en la kartoĉo. Jan Ĉengfu vundiĝis sur la ŝultro, kaj sango elfluis. Sed li ankoraŭ premis la dinamiton en la sino. Ili rigardis unu la alian, kaj ĉia miskompreno inter ili forvaporigis en tiu sola rigardo.

Li Faho portis Jan Ĉengfu en iun kavaĵon kaj demandis lin: "Kiel vi statas?"

"Malgraŭ ĉio mi devas antaŭeniri kaj ne retiriĝi," Jan Ĉengfu respondis kun kunpremitaj dentoj.

Li Faho nun rampis al Malgranda Ĉaŭ, kiu vundiĝis sur la femuro kaj la sango purpurigis la teron. Li Faho portis lin flanken kaj demandis: "Kiel vi fartas?"

"Mia femuro vundiĝis."

"Ĉu vi ankoraŭ povas pafi?"

"Jes, mi povas."

"Do vi pafu el tie ĉi kaj mi el tie, ni ŝirmu Jan Ĉengfu, ke li nepre plenumu sian komision. Ĉu vi konsentas?"

Malgranda Ĉaŭ kapjesis.

Li Faho, plene makulita de sango, rampis reen laŭ la kadavroj. La ambaŭflankaj kanonoj mugadis furioze. Kaj ĉiu colo de la tero estis flamanta. La harojn de Malgranda Ĉaŭ ekkaptis fajro kaj fumis la pantalono de Li Faho. Vidante, ke ili ne moviĝis, Li Ĉanhu konsideris ilin jam mortigitaj, kaj preparis reorganizi eksplodgrupon. Subite krakis pafiloj antaŭ ili. Blekis la aŭtomata pafilo de Li Faho kaj ankaŭ Malgranda Ĉaŭ pafis dentpremante. Jan Ĉengfu, plene kovrita de sango ekleviĝis kaj kuris antaŭen. Ekfulmis kaj sekvis surdiga eksplodo. Fortikaĵo disfalis kaj nigra fumamaso leviĝis en la aeron. Sur nia pozicio tondris aplaŭdoj. Trabeĉejo aperis kaj nia trupo antaŭenpuŝiĝis kun laŭtaj batalkrioj.

11. Finiĝo Per Medaloj

Batalon ni gajnis. Tuta divizio de malamikoj estis neniigita. Sole la kvina grupo havis kvindek ok kaptitojn. Baldaŭ okazis solena festo por la triumfo. La politika direktoro volis ke ni bone organizu orkestron. Ni invitis tri kamparanojn kaj aldone kvar kamaradojn. La orkestro estis organizita. Oni ludis per trumpeto, tamburino, r-hu²) kaj tamtamo tre gajan kaj bruan muzikon.

Jan Ĉengfu, Li Faho kaj Ĉaŭ Siaŭji staris triope antaŭ la trupo ŝultro ĉe ŝultro. La direktoro rekomendis ilin kiel "tri senrivalajn bravulojn". Poste li alpaŝis al ili kaj pendigis la medalojn sur iliajn brustojn laŭvice. Brilis flagre la ruĝaj medaloj.

Jan Ĉengfu ĵetis rigardon al Li Faho kaj Li Faho al Ĉaŭ Siaŭji. Ĉiuj aplaŭdis kun manklakoj. Farante raporton, Ĉiuj tri diris unuvoĉe:

"Ĉio dankas al la gvidado de la grupestro."

Li Ĉanhu stariĝis kaj respondis:

"Ni estas malriĉuloj kaj ĉiu havas sian doloron. Doloro fariĝas forto. La fortoj kunigitaj estas jam nevenkeblaj!"

trad. S. J. Zee

1) Jang-go: speco de kantodanco, tre ŝatata de nordĉinaj kamparanoj.

2) R-hu: Ĉina korda muzikilo.



Reveno de la Fronto

Jan Han

Tri Senrivalaj Bravuloj

(daŭrigo)

Liu Be-ju

7. Refoje pri Jan Ĉengfu kaj Laŭ Jutiaŭ.

Jan Ĉengfu multe suferis en la koro. Serĉante solecejon por iom trankviligi sin li vagiris al grenejo en la posta korto. Tien iris ankaŭ Laŭ Jutiaŭ kun klinita kapo. Ili ne puŝigis nazo kontraŭ nazo nur pro averto de paŝbruo. Kaplevante Jan Ĉengfu rimarkis Laŭ Jutiaŭ kaj kaplevante aŭkaŭ Laŭ Jutiaŭ —Jan Ĉengfu. Kvazaŭ iu ordonon: "Turniĝu malantaŭen!" ambaŭ turniĝis dorsen kaj disiris malbon-humore.

Sencele vagante, Jan Ĉengfu baldaŭ eliris la vilaĝon.

Dume Laŭ Jutiaŭ, fumante mem. faritan cigaredon, serĉis senhoman lokon kaj promenis kun klinita kapo laŭ la muro.

Jan Ĉengfu trapasis la arbareton de tiu flanko, dum Laŭ Jutiaŭ de la alia. Ambaŭ atingis la riverbordon sam-momente el kontraŭaj direktoj kaj rerenkontiĝis.

Tre koleriĝis Jan Ĉengfu kaj sakradis en la koro. Se li ne juris, ke li neniam parolos la unua kun Laŭ Jutiaŭ, li nepre satinsultus lin.

Ĝuste en tiu momento la gruestro venis serĉi ilin. Li kaptis ambaŭ je mano kaj trenis ilin returne.

Reveninte, ambaŭ mangis nenion kaj tuj kuŝiĝis.

8. Vesperé sub Lampo.

Vespere sub lampo, la gruestro ekzamenis ĉies ŝuojn ĉe la piedo de la terlito, kaj elektis du parojn de plej difektitaj el ili. Poste li kuntordis sur genuo kanaban ŝnureton kaj komencis la riparon. Dum la flikado Malgranda Ĉaŭ leviĝis kaj provis preni sur sin la laboron. La gruestro rifuzis lian helpon kaj lin konsolis ridetante: "Dormu, vi fartas nebene. Eble okazos batalo post tagiĝo." Tiam Jan Ĉengfu eksidiĝis je lia surprizo. Li etendis sian manon kaj volis forpreni de li la ŝuon. La gruestro ne nur ne cedis ĝin al li sed persvadis lin: "Vi aspektas malbone, kaj ŝajne malsanas. Dormu, laboro ne mankos al vi estonte." Jan Ĉengfu iom stultiĝis kaj rekuŝiĝis. Subite aŭdiĝis susurado kaj Li Faho leviĝis. Li diris subvoĉe: "Dormu, mi riparos por ili." La gruestro respondis ridetante: "En alia tago, mi petus vian helpon, eĉ se vi ne etendus vian manon. Hodiaŭ vi fartas ne bone, ripozu ja!"

Kune eksidis la tuta grupo, ĉar neniun endormiĝis. Ili rigardis sin reciproke. Malgranda Ĉaŭ ekploris. Singultante li eldiris ree la historieton kiun li rakontis al la gruestro la alian tagon.

"Mia patro paŝtis porkojn por terposedanto. Porkon li perdis kaj ricevis vipadon. Li mortis de ĉagreno. Antaŭ ol patro estis enterigita, mi estis forkaptita de Kuomintang kiel nova soldato.

"Mi ploris kaj kriis. Oni vipis min ĝis duonmorto per leda skurĝo trempita en malvarma akvo. Mi diris, ke mi nepre volas rerigardi mian patron eĉ se tio kostos mian vivon. "Via patro jam mortis," diris Kuomintang, "En la plej malbona kazo nur odoraĉiĝus terpeco. Kian utilon havas via ĉesto." Du jaroj jam pasis. Mian patron neniun enterigis, kaj ne troviĝis loko por lia

tombo. Ĉu liaj ostoj ne restas dise mise submetitaj al vento kaj pluvo..." Ne-fininte la rakonton, li laŭte ploris.

Aŭdinte tion, Jan Ĉengfu ĵetis sin al Malgranda Ĉaŭ kaj ĉirkaŭprenis lin.

"Mi bedaŭras, Malgranda Ĉaŭ. Antaŭe mi mal-estimis vin, kiuj venis el la regiono regata de Ĉiang Kaj-ŝek, ne sciante ke ankaŭ vi estas malriĉuloj kaj mizeruloj."

Li ne povis reteni la sen-finajn larmojn ekparolante kaj rakontis ankaŭ sian suferon.

"Se la terposedantoj murdis vian patron, ili murdis ankaŭ mian patron Kiam mi estis dekokjara, mia patro estis varbita perforte kiel kulio. Terposedanto venenis mian patron kaj mortbatis mian fraton per erpilo. Mi vidis ĉion kaŝe kaj ne atendante ilian persekuton forkuris el la hejmo. Mi atingis Liaŭ-Rivero. Rigardante al la rivero, mi vere volis ensalti kaj fini mian vivon en ĝi. Sed mi ekmemoris pri la patro. Lia vivo estas ankoraŭ en necertejo. El la tuta familio nun restas mi sola. Mi devas vivi por vengi. La terposedantoj tre kontentiĝis je mia morto. Mi almozpetis dum plena jaro. Somere mi ŝtelis maizon en la kampo, dum vintro mi kaŝrampis en la porkstalon kaj dormis tie, kiam ĉiuj lumoj jam estingiĝis..."

La tuta grupo, escepte Li Faho, eksingultis. Ĉiutage oni nur parolis pri unueco kaj solidareco, sed la hodiaŭa plendado pri siaj pasintaj suferoj malkovris ĉies internon kaj kunligis ilin kiel parencon. Malgranda Ĉaŭ rigardis Jan Ĉengfu kaj Jan Ĉengfu—Malgrandan Ĉaŭ.

"Aŭdinte vian rakonton mi ekkomprenas, ke malriĉuloj ĉie suferas same," aldonis Jan Ĉengfu.

"Vi parolas prave," respondis Malgranda Ĉaŭ. "Vin aŭdante mi ekvidas en la Okavoja Armeo de la Kompartio malriĉulojn kiuj helpas malriĉulojn. Antaŭe mi ne volis kredi tion, mi estis malsaĝulo. Mi pekis kontraŭ la revolucio kaj ankaŭ kontraŭ mi mem."

"Plendu! Se ne plendi al siaj proksimuloj, al kiuj ja?" diris la gruestro.

Dum suno subiris kaj regas la nokto, kiam da homoj sur la tero dormas dolĉan dormon, kaj ĉe kiom da aliaj pensantaj sendorme pri sia doloro, sangutoj sekvas larmojn! Ili ĉiuj rakontis unu post alia pri siaj suferoj. En tiu nokto fluis senfine la maldolĉa akvo de la kvina grupo kaj la lampo brulis ĝis tagiĝa krepusko.

9. Kion Faris Li Faho?

Li Faho silentis kun plomba pezo sur la koro. En tiu vespero li sidis apud ili sed parolis nenion. Li pensis pri tio kaj ĉi tio. Ju pli li pripensis, des pli li malamis sin. Aliaj kordoloris malferme, sed lian koron volvis kalo. Li demandis sin serioze: Ili estas malriĉuloj, ĉu vi estas riĉulo? Li memoris: kiam li estis hejme kaj juna, li ŝatis danci jang-



Jan Han

go'n⁴) kaj kanti operaĵojn. La terposedanto profitante lian diboĉecon, akaparis lian tutan bonharon kaj poste lin forpelis el la vilaĝo, eĉ ne lasante al li pantalonon por sin kovri. La edzinon li postlasis en la vilaĝo. Dum tiom da jaroj se ĝi ne reedziniĝus, ŝi jam mortus de mizero. Depost tiam Li Faho ĉiam pli profunde enmarĉiĝis. kaj eĉ lia vengfajro estingiĝis. Se li ne renkontus la Okavojan Armeon, ĉio jam estos finita por li. Kvankam li soldatiĝis pli ol du jarojn, li pensis ke li estas malinda al la revolucio, al la superuloj kaj al si mem. En tiu nokto li ne eligis eĉ unu vorton, sed faris jam decidon en sekreto. "Absinto estas maldolĉa, sed mia vivo pli maldolĉas ol ĝi. Se ne hodiaŭ, kiam estos la decido farita?" Li memoris la politikan direktoron, kiu estis lia malnova superulo kaj neniam riproĉis lin maljuste, la gruestron kiu estis lia malnova kamarado kaj estis ĉiam afabla al li, Malgrandan Ĉaŭ, tian malfeliĉan infanon kaj ankaŭ Jan Ĉengfu—li tre volonte repaciĝus kun li per manpremo. Sed kiam la parolo estis sur la lipo, li repensis: Ne necesas ĉion aranĝi en unu momento, atendu!

10. Solidareco sur la Batalkampo.

Malmulte da tagoj poste la trupo ree ĵetis sin en batalon. Kiam sur la batalkampo regis ruĝa brilo el la pafilfaŭkoj, la kampanio aliĝis al la batalo. Komence la kvara grupo faris kuratakon. Sed post kvarono da horo ĝia antaŭe ordigita plano jam tute konfuziĝis. Tiam venis ordono, ke la kvina grupo tuj antaŭen iru.

"Kamaradoj, ne forgesu nian plendon en la alia nokto, ne forgesu la malfeliĉon de Malgranda Ĉaŭ kaj Jan Ĉengfu! Jam venis la tempo por vengi niajn gepatrojn kaj gefratojn!" diris Li Ĉanhu kun rondigitaj okuloj kaj kunpremitaj pugnoj.

(Daŭrigota sur p. 7)

RICEVITAJ LIBROJ KAJ GAZETOJ

Internacia Kulturo: Kultura kaj Socia revuo de la Danubregionaj Esp-Asocioj: N-roj 10, 11 en 1949, kaj n-roj 1-2 3-4 en 1950. En la lasta numero troviĝas artikoloj pri subskribo al stokholma alvoko, pri hispania literaturo kaj pri la liberiĝo de Ĉungking en Ĉinio. Jarabono U\$2.50. Nia administracio ankaŭ peras ĝian abonon.

Esperanto-Servo: Aktuala informabulteno de Praha, eldonita de Instituto de Esperanto-Servo en Ĉeĥoslovakio, n-roj nov. dec. de 1949 kaj n-roj jan. ĝis maj. de la kuranta jaro. En la maja numero aperas la deklaro de ĉeĥoslovakaj scienc-aktivuloj, Deklaro de George Wheeler, usona ĵurnalisto en Ĉeĥoslovakio. En la deklaro li malkaŝis la esencon de usona 'demokratio' kaj informas 'libero', kaj antaŭ ĉio la maskitan militintencan. Sur fronta pago de tiu numero estas du artikoloj porpacaj. Unu el ili estas verkita de Jan Drda, prezidanto de la Asocio de Ĉeĥoslovakaj Verkistoj.

Osaka Esperantisto: dulingva organo de Osaka Filio de Japana Esperantista Asocio. N-ro 1.

J. Stalin: Nia Gvidanto: Ĝi estas traduko de du paroladoj pri Lenin fare de k-do J. Stalin. La unua, parolado de la vespera kunveno al militkolegianoj en Kremlo je la 26-a de januaro, 1924; la dua, parolado de la dua konferenco de la sovetoj en la sama jaro. La broŝuro estas klare multobligita. Eldonejo neindikita. Ĝin sendis al ni la japanaj k-do.

Al la Legantoj

Por faciligi la abonon de eksterlandaj legantoj ni ĝoje informas, ke ni akiris la konsentojn de la Administracio de Internacia Kulturo en Bulgario (Adreso: Bulgara Esperantista Kooperativo, Sofia.—Str. Tri Uŝi, 15—Bulgario) kaj k-do Einar Adamson, la sekretario de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio en Svedio, (Adreso: Einar Adamson, Värmlandsgatan 18, Göteborg, Svedio) por esti niaj perantoj en respektivaj landoj. Legantoj en ĉi tiuj du landoj vole pagu al ili. Tiuj en ceteraj landoj vole rekte skribu al nia administracio.

ABONMANIERO

- 1 Senpagan specimenon ni sendos al ĉiu, kiu letere postulos. Se iu volas daŭre ricevi nian gazeton, volu pagi laŭ la tarifo.
- 2 Kun ĉiuj esp-eldonejoj kaj esp-gazetoj ni volonte interŝanĝos reciproke periodaĵojn aŭ librojn.
- 3 Respond-kuponon ni ankaŭ akceptos kondiĉe ke inter tiu lando kaj Popola Ĉinio starigas jam diplomatia rilato.

Abontarifo

Por legantoj en	Prezo de
U.S.S.R. kaj	12 numeroj
Orienta Eŭropo	6 rubloj
Britio	6 ŝilingoj
Sudmaraj Insuloj	HK \$6.00
Svedio	6.50 kronoj
Usono kaj	
Kanado	US \$1.25

Rim. 1. Sendkoston inkluzive, rekomendon ekskluzive.
2. Legantoj en ceteraj landoj povas aboni laŭ prezo por Usono.

國內定價：每期基價一元五角，全年十二期，基價十八元，郵費在內，掛號郵費另加